


Japanoj suferas pro natura kaj politika katastrofoj

la 15an de oktobro 2019



La 11an kaj la 12an atakis Japanion treege granda tajfuno. La 12an ĝi surteriĝis ĉe la gubernio Ŝizuoka kaj trakuris tra Tokio kaj la ĉirkaŭaj gubernioj al Fukuŝima.

Pluvegis kaj ventegis multe en multaj lokoj. La damaĝoj estis grandegaj. Ĝis nun estas klare, ke pli ol 80 homoj mortis aŭ malaperis. Multaj kampoj kaj domoj estis inunditaj. La unu el la tragedioj estis morto de gepatroj kaj du gefiloj, kiuj veturis per aŭtomobilo por rifuĝi kaj erare falis en la riveron, kaj ĉiuj estis trovitaj mortaj. Oktobro estas sezono de rikoltado kaj multej terkulturistoj suferas.

La 106a Japana Esperanto-Kongreso, la jubilea kongreso memore al la 100-jariĝo de la fondiĝo de Japana Esperanto-Insititudo, la unuan tagon, la 12an, ne okazis. La duan tagon kaj la trian tagon ĝi relative bonorde okazis, sed multaj homoj ne povis veni pro malfunkciado de trajnoj kaj aviadiloj. La kongreso okazis en la urbo Saitama najbare de Tokio, kaj mi loĝas proksime, do mi povis partopreni, sed la simpozio, en kiu mi aperus kiel

preleganto, estis nuligita. Se atakus la tajfuno la 13an, la tuta kongreso estus nuligita, do ni ne estis la plej malfeliĉaj.

En tiu katastrofo la plej multe el tiuj viktimoj mortis fukuŝima-anoj. Denove Fukuŝima suferis, sed feliĉe, ŝajnas, ke neino okazis al la forĵetataj reaktoroj en la nuklea centralo de Fukuŝima.

La 25an de oktobro

Estis preskaŭ 100 viktimoj. Duono estis trovitaj hejme kaj la duono en aŭtomobilo. Viktimoj hejme estis maljunuloj, kiuj ne povis rifuĝi al rifugejo aŭ ne moviĝi al la dua etaĝo. Viktimoj en aŭtomobilo estis trafita de la inundo dum ili estis rifuĝantaj. Dum la atako de tiu tajfuno pluvegis senprecedence vaste kaj multe, do oni tute ne antaŭvidis inundon en sia distrikto kaj al sia domo.

Hodiaŭ denove pluvegas, do mi sentis maltrankvilon kaj malĝojon, bildigante suferojn en tiuj damaĝitaj urboj kaj vilaĝoj. Mi telefonis al mia amikino, kiu loĝas en la urbeto Kagamiŝi en Fukuŝima, ĉar ŝia urbo aperis en la ĵurnalo kiel damaĝita urbo. Jen estas ŝia rakonto:

Mia domo ne estis inundita, sed al la domo de mia amikino en alia distrikto de la urbo venis riverakvo kaj tri aŭtomobiloj parkitaj en iom malsupra loko estis inunditaj, fariĝinte tute ne uzeblaj. Ŝia domo estis iom inundita, sed ne tre serioze.

Mia fratino loĝanta en Iŭaki laŭ la marbordo suferas pro rompiĝo de akvotubo. Al ŝia domo ne venas akvo

(kvankam jam pasis du semajnoj post la tajfuno). Ŝi ĉerpas akvon el la puto, sed mankas akvo al bankuvo, do la familianoj iras al varmfontejo, kiu estas malfermita senpage al la loĝantoj.

La lernejo de mia nepino en la najbara urbo Sukagaŭa estis inundita en la unua etaĝo, do nur hieraŭ la lernejo remalfermiĝis. Mia nepino restis hejme dum du semajnoj. Ŝi uzas trajnon por viziti ĝin, sed la fervoja ponto estis detruita, do la trajno ne funkcias. Anstataŭe la trajnkompanio pretigas busojn, sed tio estas tre maloportuna. La alia lernejo en la sama urbo estis pli severe inundita ĝis la dua etaĝo, do ĝi ankoraŭ ne funkcias.

Fukuŝima estas fama pro produktado de fruktoj. Ankaŭ tiuj fruktejoj estis damaĝitaj. Multaj pomoj vundiĝis en akvo kaj vento. Eĉ arboj mem suferis, do mia konato timas, ke ne bone fruktos pomoj en la venonta jaro.

*Mi (HORI) volas helpi ilin, do mi mendis difektitajn pomojn pere de mia amikino.

Mi aŭdas diversajn damaĝojn ankaŭ ĉirkaŭ mi. Kiam mi vizitas tiun amikinson en Fukuŝima, mi uzas lokan trajnon, sed ankaŭ ĝi ne funkcias pro perdo de fervoja ponto. Morgaŭ okazos Toohoku-Esperanto-Kongreso en la varmfontejo en la urbo Fukuŝima, kaj por viziti ĝin, mi devas malrekte iri longan vojon, pagante pli multe. Kaj tiu kongreso mem ne okazos en la planita hotelo, ĉar ĝi estis inundita. Ĝi okazos en ajbara hotelo.

Ekonomia sufero

Ekde la 1a de oktobro la konsumimposto altiĝis de 8% al 10%. La preteksto de tiu altigo estas manko de mono por pensio kaj sanasekuro por maljunuloj. Jam kvar fojojn la registaro altiĝis la konsumimposton, komence 3%, poste 5%, 8% kaj en tiu ĉi monato 10%. Ĉiun fojon ĝi diris, ke la enspezo de la altiĝonta imposto estos uzata por la bono de maljunuloj, sed certe tio estas mensogo.

Ja Japanio fariĝas lando de maljunuloj. Mi komprenas, ke la registaro bezonas multe da mono por la maljunuloj, sed mi scias, ke ĝi timas malgrandiĝontan buĝeton por armeo, pagante pli multe por la maljunuloj. La ĉefministro Abe promesis aĉeti multege da armiloj, trudite de Usono, kaj por tio li volas konservi sufiĉan buĝeton. Tamen tiuj armiloj tute ne utilas kontraŭ tajfunoj. Ni povas eviti militon per diplomatio, sed ne tajfunojn. Nun tajfunoj kaj aliaj kataklismoj estas multe pli granda minaco al Japanio. Ne aĉetu armilojn, sed uzu la monon por digoj kaj por konstruado de domoj por la suferantoj.

La japana ekonomio nun ne estas forta, do tiu altigo de konsumimposto donos grandan damaĝon al la japana ekonomio kaj la vivado de la popolanoj. Tiu imposto donos pli grandan suferon al la suferantoj de la cunamo, tajfunoj kaj la nuklea akcidento.